# Francilia federacio
# KomitatKunsido (KK) 22/03/2024

## Partopreno

- Raymonde Coquisart (RC) ĉeestas
- Pierre Gauthier, eks-vic-kasisto (PG) ĉeestas
- Didier Janot (DJ) ĉeestas
- Aleks Kadar (AK) eks-vic-sekretario ĉeestas
- Aurélien Lestage (AL) ĉeestas
- François Lo Jacomo (FLJ) ĉeestas
- Didier Loison, eks-kasisto (DL) ĉeestas
- Laure Patas d'Illiers, eks-sekretario (LPI) ĉeestas
- Sabrina Rusch (SR) ĉeestas
- Guillaume Vera-Navas (GVN) ĉeestas

## Ekde la antaŭa komitatkunsido

La protokolo de la KK de la 12/01/24 estis aprobita kaj enretigita al https://esperanto.paris/komitat-kunsidoj

La Ĝenerala Asembleo okazis 16/03/24, la tuta tago kontentige okazis, la protokolo estas finpreparota.

## Elekto de la nova estraro

- prezidanto, kandidatoj : AK
- vic-prezidanto (nedeviga), kandidatoj : ne estas kandidato
- kasisto, kandidatoj : DL
- vic-kasisto (ne deviga), kandidatoj : PG
- sekretario, kandidatoj : LPI
- vic-sekretario (ne deviga), kandidatoj : RC

La voĉdonado okazas tuj kaj ne estas sekreta. Se estas nur po unu kandidato por unu posteno, eblas bloke voĉdoni; se ne, necesas voĉdoni por ĉiu kandidato.

Rezulto de la voĉdonado: ĉiuj bloke voĉdonas jese. La kandidatoj estas elektitaj. Gratulon al la nova estraro.

La nova sekretario sendos al Espéranto-France la listojn de la nova komitato kaj la nova estraro. Se estas nova prezidanto, kasisto aŭ vic-kasisto, necesos informi la administracion, ricevi ĝian agnoskon kaj doni la agnoskon al la banko por ke la koncernatoj povu uzi la bankokonton. Tion faros la nova sekretario kaj la koncernatoj. La nova kasisto zorgu pri la asekuro de niaj eventoj.

## Reprezentanto ĉe Espéranto-France

Partoprenas la KK de Espéranto France (4 foje jare) nome de nia francilia federacio kaj informas nian komitaton pri kio estis decidita. Ĉefaj nunaj temoj: la projekto pri la esperantaj arĥivoj en Francio, la civitaj servistoj de Espéranto France kiuj laboros en Parizo

PG plu faros

## Reprezentanto ĉe la lokaj kluboj

Rilatas kun la lokaj franciliaj kluboj, informas ilin, ĝisdatigas nian retejon pri ili, instigas neparizanojn al kreado de novaj lokaj kluboj aŭ de neformalaj lokaj agadoj.

RC plu faros

## Respondeculoj pri informkanaloj

Informi pri niaj eventoj. La unua kanalo estas la retejo https://esperanto.paris la aliaj kanaloj reeĥas la informojn. Ekestas kelkaj ŝanĝoj.

- Retejo DJ https://esperanto.paris/
- Facebook DL GVN https://www.facebook.com/esperanto.paris
- X PG SR https://twitter.com/esperanto_paris
- Mastodono PG https://esperanto.masto.host/@esperantoparis
- Dissendolisto Amikaro LPI https://groups.google.com/g/amikaro-francilio
- Telegramo AL https://web.telegram.org/z/#-1081874369
- Amikumu LPI https://amikumu.com/
- Eventa Servo DJ AK https://eventaservo.org/o/Esperanto-Paris
- Vacapo: AK SR (Viktoro) https://chat.whatsapp.com/IjLHyHenBGDFOv8yPB2Xt3
- Dissendolisto de Paris Centre pri venontmonataj eventoj DL
- Instagramo AL vidos ĉu taŭgus repreni la konton de la gejunuloj, se ne SR provos krei novan konton, ĉiukaze SR pretas provi uzi Instagramon

# Agadoj

Ekestas mallmulte da ŝanĝoj

- Ĝemelurbo kun Romo: MG
- Legoklubo: MG
- Kursoj: PG, MG, FLJ
- Junularaj agadoj: AL kun la junaj membroj, baldaŭ okazos prezento de TEJO
- Informado pri ekzamenoj: FLJ
- Esperanto-kafejo: GVN ĉiumonate
- Espéranto café croissant: GVN nun ne okazas, eble denove okazos
- Kulturaj vesperoj: PG, LPI, Régis Fournier, AK ĉiumonate
- Prelegturneoj: FLJ, ne okazis sed eble denove okazos

Notu bone 1a: post evento, iu partopreninto aŭ la organizanto sendu informojn (foton, mallongan priskribon en la franca) al raymonde.coquisart@yahoo.fr por publikigo en la reta monata gazeto Esperanto-Aktiv

Notu bone 2a: Michèle Abada-Simon pretas ĉeesti niajn eventojn, se iu bonvolas informi ŝin antaŭe kaj rememorigi ŝin la tagon mem de la evento, ŝia telefononumero estas 09 54 02 85 12

# Projektoj

- Matematika foiro en majo place Saint Sulpice: FLJ AL prizorgas, necesos deĵorantoj
- Kontakti la mezlernejojn: dormanta projekto
- Subglasoj: GVN
- Ministerio pri financaj aferoj (ties kultura francilia biblioteko "Place des arts"): DL, LPI, PG
- Nia ŝranko: AL
- Finfermi la asocion Espéranto 94: AL, RC, PG, FLJ
- Paĝmarkiloj: AL, kiam ne plu restos da
- Animation pour les habitants dans les cours d'école de Paris Centre le samedi: GVN provos

# Zamfesto

Respondecas RC

La fervojistoj sendis leteron. Nun ne klaras kion nia federacio faros venontan decembron pri Zamfesto. Estas du malsamaj tipoj de festo kaj du aliaj asocioj: festo organizata de la fervojistoj kun ioma helpo de ni, festo kunorganizota de la pariza grupo de SAT-Amikaro kaj ni. Ĉu ni partoprenos al ambaŭ? Ĉu al nur unu kaj kiu? Ĉiukaze kiel? La afero estos diskutata en kunsidoj kun la du aliaj asocioj.

# Disdonado de libroj al publikaj bibliotekoj

MP intencis fari sed ne havis tempon. Neniu komitatano deziras fari, do la projekto plu dormos.

Grava paĝo pristudinda https://bibliotheques.paris.fr/Default/apprendre-une-langue.aspx Ekzistas 8 bibliotekoj kun "Pôle langues", ili estu niaj unuaj celoj. Sciu ke la biblioteko Marguerite Yourcenar volonte akceptis librojn de ni (AK, LPI) dum ĝia evento pri lingvoj "jardin des langues" 03/06/23. Se biblioteko ne havas lernolibron de Esperanto, ni provu doni unu. Ni jam aĉetis 10 libretojn "Metodo11" por donaci al bibliotekoj (vidu https://esperanto.paris/IMG/pdf/2022-12-02.pdf ). Ankaŭ eblas

doni : la ekzerc-kajero de Assimil (ĉar Assimil estas fama), facila legaĵo (ekz Stranga malapero), vortaro FR-EO – EO-FR… Pri la parto, " Lire en langues étrangères ", eblas disdoni kelkajn verkojn originale en Eo aŭ tradukojn de famaj verkoj (ekz. La eta Princo, Tinĉjo).

# Subvencioj

LPI proponas doni monon (po 10€) al Balotilo kaj al Framasoft, ĉar nia federacio uzas iliajn ilojn. La komitatanoj voĉdonas pri la proponoj. Ĉiuj konsentas. La 2 donacoj estas deciditaj.

# Vizito de eksterlandanoj

Fernando, sperta esperantisto el Kubo, kun amiko Paul, komencanto irlanda/nederlanda, vizitos Parizon de la 15a ĝis la 19a de aprilo. Ili deziras renkonti lokajn esperantistojn kaj ŝatus ke iu ĉiĉeronu ilin. Vendredon la 19an, ili pasigos la tutan tagon kaj vesperon kun membroj de la pariza grupo de SAT-Amikaro. Ili do liberas dum la aliaj tagoj, t.e. de la 15a ĝis la 18a.

Ne okazos kultura vespero lundon la 15an. La marda kurso de FLJ ja okazos la 16an. La ĵauda kurso de PG ne okazos la 18an. Do la sidejo liberos vespere: lundo 15, merkredo 17 kaj ĵaude 18. FLJ pretas organizi la vesperon. La dato estas fiksita al lundo la 15a. Ni anoncos la eventon en niaj informkanaloj : renkontiĝo en la sidejo, 15/03 vespere, babilado pri Kubo, kunmanĝado (ĉiu alportas ion, manĝaĵojn kaj trinkaĵojn por disdoni).

Neniu komitatano pretas ĉiĉeroni ilin dumtage, do ni serĉu pere de la listo.

Fernando kontakteblas per Telf. +53 5539 0704 E-mail: feredes.1946@gmail.com

# Niaj retpoŝtadresoj (memore)

Adresoj kreitaj de nia federacio, administrataj de prezidanto kaj sekretario

- komitato-francilio@googlegroups.com, resendas al la komitatanoj
- membraro-francilio@googlegroups.com, resendas al la membroj aliĝintaj por la jaro 2023-2024 (mane ĝisdatigata 16/03/24 sed ne poste)

Adreso kreita de nia federacio

- amikaro-francilio@googlegroups.com, resendas al ĉiuj interesatoj pri niaj eventoj, iu ajn povas mem aliĝi kaj malaliĝi

Adreso kreita de Espéranto-France, ne uzita

- francilio@esperanto-france.org, iu ajn povas mem aliĝi kaj malaliĝi, vidu ĝian priskribon https://esperanto-france.org/sympa/info/francilio

Kontaktadreso de nia retejo esperanto.paris, la resendadon administras Emmanuelle Richard

- info@esperanto.paris, resendas al la estraranoj kaj Said Baluŝi

# Venonta KK

KK okazas trimestre. La venonta KK okazos merkredon 12/06/2024 je 19:30, ĉu rete, ĉu surloke, ĉu mikse. Tiam ni parolu interalie pri la venontjaraj kursoj kaj la septembraj varbaj eventoj.

# FINO DE LA KK